

ESPERANTO PROVENCE

Numero 92 - Printempo 2013

4 numeroj/jare

www.esperanto-provence.org

redaktoro:

Pascal Vilain

p.vilain83@orange.fr

61 montée du Castelar

83460 TARADEAU

04 94 73 33 24

www.facebook.com/esperantoprovence

kasisto:

Michel Cerisay

mcerisay@gmail.com

15 Place des Vents Provençaux

13140 MIRAMAS

baza kotizo al la Federacio (kun bulteno): 6 eŭroj

VORTO DE LA PREZIDANTO

Pasis jam kelkaj semajnoj post la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres.

Mi certas, ke ĉiuj partoprenintoj de la diversaj kursniveletoj havis la eblon laboregi kaj lerni multajn lingvajn subtilaĵojn.

Mi dankegas la geresponsulojn de la grupo Fréjus - Saint-Raphaël pro la mirinda akcepto kaj la amika etoso, kiu ŝvebis dum la tuta staĝo, sen forgesi kompreneble la gegvidantojn, kiuj kontribuis al la sukceso de la evento.

Nia federacio Espéranto-Provence profi-

tis la okazon de tiu ĉi mirinda staĝo por estigisian ĝeneralan membro-kunvenon, kiu arigis ĉiĉfoje multe da membroj. Ĝis nun, mi neniam vidis tiom da el ili: tio pruvas ke « Espéranto-Provence » bone funkcias kaj kontentige laboras.

Kiel prezidanto, mi povas nur esti feliĉa pro tiuj ĉi atingoj kaj esperas, ke nia federacia grupo plu kreskos kaj aktivos en la praktikado kaj divastigo de nia lingvo.

Pierre Oliva

MEMBRO-KUNVENO JE LA 10A DE MARTO

Post la magra partopreno pasintjare en Romans, estis decidite okazigi la membrokunvenon dum la Mediteranea Esperanto-Semajno. Kaj tute prave, ĉar ĉeestis trideko da homoj dum deko sendis rajtigilon.

Ĉefa konstato estas, ke la membroj maljuniĝas, granda parto de la kluboj lamas, ĉefe en grandaj urboj, kiel Aix, Marseille, Toulon aŭ Nice. Sed same grave, nur homoj, kiuj jam partoprenis aranĝon partoprenos novan. Diskuto en kiu intervenis pli ol dek homoj montras, ke nun la homoj lernas nur se ili gajnos monon poste, la rilatoj estas retaj sed malofte la homoj renkontiĝas; la avantaĝoj, kiujn proponis Esperanto (ekz. Pasporta Servo) iĝas kutimaj tra aliaj fontoj.

Financoj

Decidite estis doni al Esperanto-Le Beausset, kiu ĵus kreiĝis, duonon de la profito de la novembra staĝo kaj pagi la deficiton de la koncerto de jOMo en La Ciotat.

La kotizo restas je 6 eŭroj jare. Ĉefa elspezo venas el fotokopiado kaj ekspedado de la

bulteno "Espéranto-Provence", eĉ se pluraj ricevas ĝin rete.

Agadoj

En kelkaj urboj, la klubo aktive partoprenas Forumon de Asocioj, Tagon de Patrino Lingvo kaj Tagon de Paco, sed malmultaj tenas rilatojn kun aliaj asocioj aŭ peras servojn (ekz. kun ĝemelaj urboj). Por krei amikajn rilatojn estas proponitaj ekskurso al Col de l'Ange la 28an de Aprilo kaj komunaj vizitoj al senpagaj ekspozicioj. (ekz. okaze de la « Journées du Patrimoine », ni kune povus viziti unu urbon. Kiu sin proponas?)

Informado

Ĉar la reto iĝis LA informkanalo, ni esperas, ke la lokaj respondeculoj nutros nian TTTEjon. Françoise Noireau iĝas la respondeculo pri paĝo en Facebook kaj similaj. La ekspozicimaterialo estas ne sufiĉe uzita. Kelkaj medioj estas komplete forlasitaj: ekz. maristoj, skoltoj, universitataj kampadejoj, kiuj somere organizas diversajn staĝojn.

Instruado

Venas propono provi unue instrui perrete kaj poste en ĉeesta kurso. Sed restas la demando : kiel trovi la kursanojn ? Ne estas komencantoj en la diversaj urboj, bedaŭrinde. La problemo de la ekzameno ne estis tuŝita, dum ŝajnas nature organizi denove intensivan staĝon en Le Beausset fine de Novembro.

Statutŝanĝoj proponitaj de Esperanto-France

Tegmenta asocio, kiu kunigas la esperantistojn en Francio, Esperanto-France proponas statutŝanĝojn. Inter ili, art. 4 estas ne tre komprenebla ĉar asocioj estu aliĝintaj (malaperas kontrakto) kaj sendependaj. Pascal Vilain klarigas, ke ĝi celas pagi al ĉiuj esperantistoj nur unu kotizon (kluban+regionan+nacian), kio permesos malaltiĝi la prezon kaj la abonon al le Monde de L'Espéranto. Eksperimento jam okazas en Béziers.

Komitato de Esperanto-Provence

Estis renovigita la Komitato : pro manko de kandidatoj restas la samaj homoj, same en la estraro.

Elektitaj

ĝis 2014: Claudie Demongeot ; Franz Mimmersheim ; Pascal Vilain

ĝis 2015: Pierre Oliva, Thierry Spanjaard, Renée Triolle

ĝis 2016: Monique Arnaud, Michel Cerisay, Gilles Wallez

Redaktoro de la bulteno restas Pascal Vilain

Respondeculo de la TTTejo: Franz Mimmersheim

Respondeculo por Facebook: Françoise Noireau

Reprezentanto de la Federacio ĉe Esperanto-France: Monique Arnaud.

protokolis Renée Triolle



30 gefederacianoj ĉeestis la membro-kunvenon

NIA FEDERACIO SUR LA RETO

Ĉu vi memoras, ke nia federacio disponas pri belaspekta kaj interesa TTT-ejo, profesie estrata de nia amiko Franz Mimmersheim ?

Ĉu vi regule - eble eĉ ofte - vizitas ĝin ? Ĉu vi nutras ĝin per artikoloj, fotoj, sciigoj pri Eo-eventoj en via urbo ? Se ne, nepre prenu la kutimon tion fari ! Ĝia adreso, de nun, estas

videbla sub la ĉefpaĝa bultenonomo.

Apudas ĝin alia ligo : tiu de ĵus aperinta « Facebook »-paĝo, kiun ni ŝuldas al Françoise Noireau. Mi certas, ke la prizorgantino, same kiel Franz, estos ege kontenta ricevi informojn, fotojn, komentojn...

Do, tuj al via klavar' !

NOVA TUTMONDA KER-EKZAMENSESIO

Ĉu eblas, ke iuj anoj de nia Provenca Federacio ankoraŭ ne trapasis KER-ekzamenon ?

Nu, se vi estas unu el ili, nepre ne maltrafu la okazon tion fari en Junio.

Ni ja ricevis la prian mesaĝon de Katalin Kovats, nome de edukado.net :

« Kiel vi eble scias, ni denove okazigos tutmondan KER-ekzamensesion, al kiu kampanjo el via lando aliĝis ĉi-jare sep urboj : Araso, Avinjono, La Roche-sur-Yon, Limoĝo, Liono, Parizo kaj Tuluzo.

Tio signifas, ke tie la 8an de Junio okazos skriba (en kelkaj lokoj eĉ parola) KER-ekzameno, kiun vi povus partopreni.

Bonvolu informiĝi pri la detaloj ĉe la ekzamenpaĝo > ĝeneralaj informoj :

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Anonco:

<http://edukado.net/novajhoj?id=328>

Se vi deziras partopreni, jene vi trovos la aliĝilon ĉe via urbonomo kaj lando :

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Se necesas pliaj informoj:

- pri enhavaj demandoj > kontaktu Katalin Kovats ĉe ker-ekzamenoj@edukado.net
- pri organizaj aferoj (loko, dato, pagoj) > kontaktu la personon kies nomon vi trovos ĉe la aliĝ-paĝo. Ni esperas, ke multaj el vi kaptos la okazon kaj trapasos iun nivelon de la ekzameno.

Amike salutas vin, Katalin Kovats»

Kaj Michel Cerisay jam sciigis al ni, ke tiun 8an de Junio okazos en Avinjono KER-ekzamenoj je la niveloj B1 kaj B2.

Por informoj, bonvolu rilati kun Rose-Marie Quintin rosemarie.quintin@sfr.fr aŭ Michel Cerisay.

EL NIAJ FEDERACIAJ ASOCIOJ (KAJ TIES ANOJ)

04 - Esperanta Kulturo en Manosque ekspozicio

Kiel anoncite en la vintra numero de nia bulteno, okazis Esperanta semajno en la Manosque-a turismoficejo, de la 18a ĝis la 23a de Marto.

ÉCHANGES

Espéranto kulturo s'expose à l'office

L'association Ekem (Espéranto kulturo en Manosque) est à l'Office de Tourisme de Manosque jusqu'à samedi 23 mars aux horaires habituels de l'Office. José Grammatico "fer de lance" de la langue universelle depuis de longues années à Manosque, mais aussi ses amis Jean François, Monique, et Bernard, sont présents pour répondre à toutes les questions des visiteurs.

"L'Espéranto est aujourd'hui en pleine expansion explique-t-il et il permet à plusieurs millions de personnes de par le monde, de communiquer grâce à cette langue, facile à apprendre (éventuellement par le biais d'Internet)".

Contacts
À Manosque, le groupe se réunit le 1^{er} et le 3^e mercredi de chaque mois, de 17 h 30 à 20 heures à la Maison des associations, boulevard de Temps-perdu, en face du lycée des métiers Martin-Bret. Alors, "gis baldau", soit "À bientôt !" ... en Esperanto

J.P.

Adeptes de cette langue universelle, ils viennent à vous.

/PHOTO L.P.

raportis pri tiu evento la ĵurnalo La Provence, en sia eldono de la 21a de Marto.



ekspozicio en la turismoficejo

05 – Espéranto-Gap

Kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres, Monika Arnaud aldonis detalojn al la prelego de Gilles Wallez pri Sicilio kaj la 79a Itala Kongreso, kiu tie okazis. Ĉar ankaŭ Monika partoprenis, ŝi parolis pri siaj tieaj travivaĵoj.

13 - Espéranto - La Ciotat

Festo de la Tri Reĝoj

La 9an de Januaro okazis reĝkuka festo.

Bedaŭrinde ni nur duontempe parolis en Esperanto, pro la malbona kutimo krokodili, kaj poste ni ne multe laboris en la vespero, sed kian agrablan etoson ni spertis !

raportis Pierre Oliva



en amika etoso

Virina tago la 8an de Marto



Mireille Périer elpensis ludon por la okazo

« Musiques du Monde » :

Concert de jOmO à La Ciotat le 26 février

Dans le cadre de la Journée Mondiale de la Langue Maternelle, initiée par l'UNESCO, Es-

péranto-La Ciotat organisait une soirée-spectacle au Théâtre du Golfe. Au programme :

Esperanto-La Ciotat invite
L'UKRAINE
concert musique du Monde
Oles ZHURAVTCHAK
flûtiste virtuose
jOmO
chanteur polyglotte
record Guinness des langues
Théâtre du Golfe
la Ciotat le 26 février 2013 à 20h30
réservations au 04 42 71 42 74 ou esperanto.laciotat@wanadoo.fr

Oles Zhuravtchak, flûtiste ukrainien, incontournable organisateur d'un grand festival de musique en Ukraine, et jOmO, guitariste et chanteur polyglotte. Hélas, Renée Triolle, représentante à l'UNESCO de Universalas Esperanto-Asocio et professeur d'espéranto à La Ciotat, devait annoncer que Oles ne viendrait pas, les autorités françaises lui ayant refusé un visa français. On ne sait jamais, au cas où il aurait voulu rester en France et demander l'asile politique, le bougre ! Ah, méfiance et discernement, quand tu nous tiens... !

Quant à jOmO, il a littéralement enthousiasmé la salle. Tour à tour chanteur, mime, comique, guitariste virtuose, il a su charmer le public, capter son attention, le faire participer, tout cela dans une atmosphère bon enfant.

Il nous a émerveillés avec un appareil rediffusant sa musique juste après qu'il l'ait jouée, lui permettant d'improviser, de dialoguer avec le public et même de réparer une corde ! Il a chanté en catalan, en basque, en espagnol, en anglais, italien, polonais, russe, ukrainien, chinois, japonais et naturellement espéranto, et j'en oublie... Guitariste, danseur, chanteur et pédagogue original, il a permis aux spectateurs qui avaient bravé les intempéries de passer une soirée qu'ils ne sont pas près

d'oublier.

A la plus grande joie du public, il a promis de revenir, avec Oles Zhuravtchak cette fois. J'ai même entendu une dame, à la sortie, dire que ce concert lui avait donné l'envie d'apprendre l'espéranto.

Un grand merci et bravo à Espéranto-La Ciotat pour cette magnifique soirée si réussie !

Pour en savoir plus sur jOmO, (Jean-Marc Leclercq), il ne vous reste qu'à visiter son site en quatre langues (français, polonais, espéranto et occitan) :

<http://www.jmleclercq.eu/>

raportis Alain Rémy

Promenado kaj Pikniko

Vidu informojn pri ĉi tiu evento, kiu okazos proksime de La Ciotat, en la rubriko : « Venontaj rendezuoj » (28an de Aprilo).

83 - Esperanto-Klubo de Fréjus-Saint-Raphaël

Reĝkuka festo kaj ĝenerala membro-kunveno

Estas plaĉa kutimo : fine de Januaro, membroj de nia klubo kuniĝis ĉe Monique kaj Pierrot por la tradicia reĝkuko. Kelkaj eĉ venis jam antaŭtagmeze por havi la eblon kune tagmanĝi en amika etoso. Sed rapide tempis iri al pli seriozaj aferoj : ekde la 15a komenciĝis la membro-kunveno kiu pritraktis ne nur fariĵojn, sed ĉefe planitajn agadojn, i.a. la verŝajne plej ampleksan : la organizadon de la nun fama Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres.



Labora etoso cirkaŭ la tablo de Monique kaj Pierrot

Tradicia M.E.S. ĉe la Lazura Marbordo en Francio

Dum verŝajne ŝvebas plu en ĉies memoroj - almenaŭ en tiuj de la feliĉaj partoprenintoj - belaj bildoj pri la ĵus pasinta M.E.S., ni ricevis du raportojn pri la evento... Jen ili :

Mia unua Mediteranea Esperanto-Semajno

Mi partoprenis la Esperantan semajnon en « Les Issambres » inter la 8a kaj la 16a de Marto 2013.

Ni estis grupo de naŭdek kvin personoj kaj la plejmulto el ni loĝis en belega hotelo marborda apud Saint-Raphaël kaj Fréjus, kie ni povis manĝi trifoje tage en memserva restoracio. Ĉeestis dudek kvin eksterlandanoj venintaj el ok landoj : Japanio, Germanio, Hispanio, Svedio, Litovio, Italio, Rumanio kaj Belgio.

La kursoj okazis matene dum tri horoj kaj vespere dum unu horo.

Kvin personoj instruis Esperanton je kvin niveloj:

- Christine Graissaguel por la veraj komencantoj.
- Mari-Roza Vilain por la komencintoj.
- Josée Lafosse por la parolantoj.
- Rodica Todor por diskuti kaj analizi kun parolantoj.
- Pascal Vilain por pritrakti la lingvaĵon de Georges Lagrange (Serĝo Elgo) kun parolantoj.

Mi estis kun Josée Lafosse kaj ni laboris tre bone pri diversaj temoj. Ŝia ĉefa celo estis paroligi la ĉeestantojn. Ni estis regule deko da fideluloj kaj ni progresis bone. Vespere ni preparis tri etajn teatraĵojn, kiujn ni ludis dum la adiaŭa vespero por amuzi la grupon sed ĉefe por ke ĉiuj aktoroj provu memori iom da teksto. La gelernantoj estis tre agrablaj, atentemaj kaj diligentaj. Ni ankaŭ kantis, aŭdinte KD-on de Jacques Yvart, kiu kantas esperantigitajn tekstojn de Georges Brassens. Estis granda plezuro por mi malkovri tiun kantiston. Mi dankas al Josée pro ŝia vikleco kaj ŝia helpo-preto.

Mi renkontis multe da interesaj personoj dum la manĝadoj. Mi parolis ofte pri la esperantista movado kun Monique Arnaud, kiu ŝatas paroli malrapide kaj bone artikulacii. Mi retrovis Isabelle Saulnier, kiu estis mia partnero en la skeĉo, Vajda Matuzeviciene, litova kuraĉistino, kiu prezentis belegan prelegon pri sia lando kaj invitis ĉiujn partopreni la 49-ajn Bal-

tiajn Esperanto-Tagojn en Litovio inter la 6a kaj la 14a de Julio 2013.

Mi partoprenis la viziton de la muzeo en Draguignan (Artoj kaj Provencaj tradicioj) kaj mi parolis en la buso kun Jeanine Ratouchniak pri ŝia profesio: biologio-serĉisto. Mi admiris Daniel Moirand, kiu tradukis la gvidparoladon dum pli ol unu horo. Ĉiokaze, mi plian fojon malkovris la belecon de Esperanto.

Jacques kaj Irène Ravary invitis min multfoje por trinki kafon en sia loĝejo, kie Jacques klarigis al mi pri sia kunlaboro kun instruisto en unuagrada lernejo. Ili ebligis Esperante komunikigi francon, italan kaj rumanan klasojn danke al la Eŭropa projekto Komenio (Comenius). Tiu laboro en Périgueux daŭris dek kvar jarojn.

Ĉirkaŭ la tablo, mi renkontis Martine kaj Max Demouy, kiujn mi retrovos en Rejkjaviko la venontan someron dum la UK.

Tro rapide la semajno pasis kaj ĉiam mi rememoros ĝin ĉar mia edzo Pierre kaj mia naŭjara nepino Mila tiam eklernis Esperanton.

Sabaton, ni revenis hejmen kaj la postan tagon, nia filo Antoine, patro de Mila, skribis al ni : « Mila ploris hieraŭ vespere, rememorante la belegajn feriojn, kiujn ŝi trapasis kun vi ! »

Kia bela donaco !

raportis Silvi Plantier (unuvara esperantistino)

ROQUEBRUNE-SUR-ARGENS var-matin
Mardi 13 mars 2013

Un stage d'espéranto réunit dix nationalités aux Issambres



Les stagiaires et leurs instructeurs réunis pour une semaine à Vacanciel des Issambres. (Photo D. O.)

Un stage d'espéranto, langue universelle parlée dans le monde entier, est actuellement dispensé à Vacanciel des Issambres, où il est organisé par Christine Grassaguel et Monique Precioso. « Il s'agit, précise Pascal Vilain, maître de stage, d'une langue qui véhicule des valeurs d'humanisme et de paix. Nous en avons tous entendu parler dans les écoles, mais ce n'est qu'en suite que vient l'envie de l'apprendre puis de l'enseigner. » Dix pays (Italie, Japon, Roumanie, Allemagne, Lituanie, Espagne, Belgique, Suède, Ghana et France) sont représentés sur ce stage, qui réunit quatre-vingt-douze stagiaires jusqu'à la fin de la semaine.

Cours et visites
Au programme, des cours de 9h 15 à 12h 15 puis, après le repas, excursion découverte de la région et repas de cours de 18 à 19 heures. La soirée est consacrée à des projections de films aux thèmes différents, en Espéranto. Trois niveaux sont ici enseignés : débutants, personnes qui veulent pratiquer la langue et l'utiliser oralement et locuteurs confirmés.

À noter encore que Saint-Raphaël et Fréjus font partie des rares communes de la région à compter une association d'espéranto ⁽¹⁾.

D. O.
¹ : Se membres se réunissent tous les lundis à 15 heures à la maison des associations, rue de Verdun à Fréjus, sauf pendant les vacances scolaires.

artikolo en Var-Matin

Mi partoprenis la Mediteranean Esperanto -Semajnon en Francio

Por la unua fojo, mi partoprenis la Mediteranean Esperanto-Semajnon en Francio.

Nico akceptis min kun pluvo, sed tamen bu-

so portis min al Saint-Raphaël. Eta problemo ĉe ŝoforo, ĉar li ne kapablis ŝanĝi 50€.

Vendredon posttagmeze, iu devus akcepti min ĉe bushaltejo en Saint-Raphaël, sed miskompreno prokrastis tion. (Vidu : E-o ne solvas ĉiujn problemojn !). En pluveto mi konkeris la urbon. Tre facile ĉar nemultaj homoj restis surstrate. Ĉu timo pro nova sveda invado ?

Sabaton okazis la « Granda Akcepto »: « Bonan Tagon S-ro kaj ĝis revido ! » Multaj vizaĝoj estis jam konataj de mi, sed ankaŭ aperis tute fremdaj kaj novaj (laŭ aĝo ne). Homoj grupiĝis en jam konataj kaj fidindaj konstelaciojn. Foje, tamen, aperis iu konfuzita kuraĝulino preta enstrudiĝi. Povus esti tre sukcese por ambaŭ flankoj !

Scivolemaj kaj tiklaj demandoj flugis tra la aero kaj ĉambro ! « Ĉu pluvis ĉe ni hieraŭ ?... Aha, vi entute ne havis veteron hieraŭ ! Bone ! »

Por elekti kion manĝi, mi devis plurfoje rondiri por fine decidi kion elekti. Demando kiu bezonis kaj tempon kaj pripensadon, eble ankaŭ kuraĝon kaj scivolemon. Ne ĉiam trafa elekto ! Krom la tortoj !!! Resume : varie, interese kaj pli ol sufiĉe. Kaj ĉio, tio por tre lerta sveda esperantisto, kiu havas nur du regulojn por bone uzi Esperanton : neceso kaj sufiĉo.

Promenante mi povis havi pli intiman kontakton kun florantaj mimozoj. En mia regiono simile svarmas ĉerizarboj. Krome mi ŝatas la « mimozo-salaton », kiu konsistas parte el fruktoj.

Diversaj ekskursoj tentis min kaj mi vizitis Muzeon kun olivmuelejo ; cetere estas mirinde konstati ke malnovaj laboriloj tiel similas unu la alian en diversaj landoj.

Vespere okazis programoj por distri la ĉeestantojn. Ĉiuj por mi vere interesaj, eĉ profesie kaj bonhumore prezentitaj !

Kompreneble mi devis ankaŭ lerni, studi, venki la komencistan nivelon aŭ eĉ pli. Kompaktindaj instruistoj ! Ni dum longa tempo provis per klabo fiksi la scion enkapo ĉe homoj, sed en pli moderna socio oni ne plu akceptas tiun rafinitan metodon.

Iu « intermezzo », vendredon, malebligis al mi partopreni la finon de tiu aranĝo. Anstataŭ atendis min malsanulejo, kie mi restis pli ol semajnon. Mi neniam sentis tiom da intereso por mia sano, tiom da bonkoraj homoj, kiuj pretis

ĉiamaniere helpi min. Inter tiuj estas kelkaj, kiujn mi unuafoje renkontis dum tiu aranĝo. Kiom da venis por viziti min en la hospitalo ! Mi mencias neniun nomon por ne riski forgesi iujn. Al ĉiuj mi diras tutsimple : KORAN DANKON !

Esperable ni renkontiĝos sekvontjare en la sama ejo kaj en bona etoso.

raportis Gunnar Olsson

Ni tamen ne forgesu aldoni, ke estis kelkaj ombroj en tiu rava staĝpanoramo : monŝte-
loj, kiujn suferis du el la staĝantinoj, eĉ, pour unu el tiuj du, perdo de valizo en trajno, survoje al la flughaveno (feliĉe rapide retrovita)... sed ĉefe kaj plej grave : korproblemo, kiun trafis nia amiko Gunnar, el Svedio (kies raporton vi ĵus legis) kaj kiu malebligis al li foriri aviadile por plua antaŭvidita programo. Li estis enhospitaligita en Fréjus kaj estis planite, ke li reiros Svedien en flega akompano de lialanda kuracisto... kaj tio preskaŭ okazis, sed lastsekunde, en la Nica flughaveno, tiu kuracisto decidis pri neebleco de la vojaĝo. Gunnar revenis do al la hospitalo, kie li estis finfine operaciita, kaj kie li plu restas je la dato de tiu artikolo, fine de Mar-
to.

La tuta staĝo-partoprenintaro kaj la federacianoj deziras al li kiel eble plej rapidan kaj kompletan resaniĝon.

n.d.l.r.

83 – Espéranto – Le Beausset Kurso



la lernantoj kun Nicole Lafitte, kursgvidantino

AGADO DE IZOLITAJ GEFEDERACIANOJ

anoj de la departemento « Alpes-Maritimes »

Prelegis kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres :

* Philippe Chavignon, el Guillaumes, pri esencaj

Ekde la 12a de Januaro okazas Eo-kursoj por 4 lernantoj de du niveloj : unu progresantino kaj tri gekomencantoj. Plie, partopreninto en la decembra staĝo organizita de nia klubo laboras nun per KD kaj la Reto, kaj fojfoje ren-
devuas kun ni por peti klarigojn pri tio, kion li ne bone komprenis.

Tiuj ĉi kursoj okazas dufoje en la monato dum tuta mateno (9a ĝis 12a) en « Pôle Saint-Exupéry ».

Ekspozicio

Grava evento por la tutnova Esperanto-asocio : starigo de ekspozicio en « Pôle Saint-Exupéry », la urba kultura centro. Multaj afiŝoj, libroj, revuoj, diskoj, filmoj... atendis la vizitantojn de la 1a ĝis la 9a de Februaro.



Pierre Oliva, videble feliĉa prezidanto de la nova asocio

La inaŭguro de ĉi tiu evento kunigis du-dekon da personoj la vendredon 1an de Februaro, en la ĉeesto de adjunktino de la urbestro.

La 6an de Februaro, en la kultura centro « Pôle Saint-Exupéry, okaze de la ekspozicio pri kiu vi legis ĉisupre, Alain Rémy raportis pri sia antaŭlasta vojaĝo al Ĉinio, Usono...

raportis Pierre Oliva

oleoj

* Jean-François Cousineau, el Nico, pri Burkino, kun prezento de sia filmo.

* Gilles Wallez, el Nico, pri Sicilio, kien li iris por partopreni en la Itala Kongreso 2012.

* Jean-Pierre Cavelan, el Nico, pri Esperanto kaj

Interreto.

Eblas legi lian prelegtekston, priajn komentojn de legintoj, kaj vidi fotojn, sur la jenaj paĝoj :

*<http://kavlan.perso.sfr.fr/esperanto-en-eo/prelego2013.html>

*<http://kavlan.perso.sfr.fr/esperanto-en-eo/prelego2013posta-diskuto.html>

*<http://kavlan.perso.sfr.fr/esperanto-en-eo/Galerio%20Issambres/index.html>

ano de la departemento

« Bouches-du-Rhône »

Dum la paŭzoj de la MES-staĝo, Jean-Pierre Schneider, el Barbentane, zorgis kiel kutime pri la libroservo de la asocio « Sociala Integriĝo kaj Esperanto », helpate de Claudie Demongeot, prezidantino de tiu asocio.

anoj de la departemento

Var » (Taradeau)... kaj de aliaj landoj...

Atendante oficialan eventon (ni plu esperas, ke tio finfine okazos!) kun la vilaĝa konsilantaro por festi la titolon « Verda Esperantista Stelo », aljuĝitan al Taradeau, la lokaj esperantistoj foje

travivas jam plene internaciajn momentojn.

Tiel, la sabaton 6an de Aprilo, renkontiĝis Mari-Roza, nederlandlingva belgino, Martin, ĉeĥo, Zoran, serbo, Françoise, Jean-Marie kaj Pascal, francoj. Nia internacia lingvo kompreneble ebligis fluan kaj ĉiuteman paroladon, kaj la sola ĉeestanto ne scipovanta paroli Esperanton, Jean-Luc, tutcerte komprenis la facilecon kaj utilecon de nia lingvo !



de maldekstre dekstren : Jean-Marie, Jean-Luc (sola ne-esperantisto), Martin, Zoran, Françoise kaj Mari-Roza ; mankas Pascal, kiu fotas.

EN LA RETROSPEGULO

Jen artikolo, kiun mi plukis en iama « Heroldo de Esperanto », tiu de la 16a de Februaro 1957. (bedaŭrinde sen la aŭtonomo – dankon al la nekonata talenta verkinto pro la bela stilo kaj riĉa enhavo !)

Kial aperis tiam teksto pri Marsejlo ? Ĉar tiu ĉi granda urbo, hodiaŭ ĉefurbo de nia P.A.C.A.-regiono, gastigis Universalan Kongreson antaŭ 56 jaroj.

Kaj kial reaperigi ĝin en nia nuna federacia bulteno ? Ĉar Marsejlo ĉijare estas Eŭropa Kultura Ĉefurbo 2013 kaj pro tio estos vizitata de multaj turistoj, i.a.eble de kelkaj esperantistoj.

Tiuokaze, la urbo amplekse ŝanĝiĝis kaj disponas nun, ekzemple, pri pliaj kulturcentroj.

Nu... kion pensas pri tiu evento, pri sia urbo, pri la tieaj vivkondiĉoj, k.t.p. niaj Marsejlaj samideanoj ?

Estus plaĉe al mi aperigi en la venonta numero kelkajn komentojn aŭ vidpunktojn de

Marsejloj.

Se konsentite, ek al viaj skribilo aŭ klavaro...

el la red.

Rendevuo en Marsejlo

Riskante esti akuzata pri troigo, necesas diri, ke la plej malnova urbo en Francujo ne estas nur urbego, ĝi estas laŭ sia maniero tuta mondo.

Marsejlo estas la suno, la maro, la vento, la koloro kaj la movado, la belsona parolo kaj la klara rido, la sencela tempoperdo kaj la subita ekscito, la provinca kaj kosmopolita, bruanta kaj diverskolora popolamaso, iafoje laŭtega, ĝojoplana kaj ĉiam gaja, gapante sur la avenuoj, penante en la fabrikejoj, plenigante per sia vivo kafejojn, butikojn kaj magazenojn, sin agitante laŭlonge de la kajoj kaj de la moleoj, ĉirkaŭ la basenoj, en la senĉesa rulado de ŝarĝveturiloj,

spiregado de maŝinoj, martelado de kalfatristoj, kriegoj de fajfiloj, meze de flavruĝa nebulo, farita el polvo kaj varma aero, aŭ en blindiga lumo, tranĉita de fulmoj. Urbo, same kiel Proteo, kun multaj vizaĝoj.

Marsejlo kun popularaj kvartaloj, piede de la monteto « Notre Dame de la Garde », kun siaj polvaj stratoj, meze de kiuj la abatejo Saint Victor minace starigas siajn muregojn de fortikaĵo supre de antikva nekropolo, kie sin kaŝas nigra Dipatrino en profunda labirinto de kriptoj sanktigitaj per respektindaj memoraĵoj.



La malnova haveno

Marsejlo kun la malnova haveno, kun preskaŭ flavaj akvoj, sur kiuj balanciĝadas anstataŭ foceaj (el Foceo, antikva Greka urbo en Malgranda Azio) galeroj aŭ Romiaj triremoj, tre modernaj jaĥtoj, kie la velŝipoj arbare konfuzas siajn mastojn kaj ŝnuregojn inter kajoj animitaj de ĉiama irreveno de maristoj, portistoj kaj de vendistoj, kiuj proponas ĉion, kion oni povas trinki aŭ manĝi, de oranĝoj elŝipigitaj el la Majorkaj balanceloj ĝis la triglo, la marskolopo.



La Canebière



Palaco : Longchamp

Marsejlo kun la « nova urbo », kiu, surgrimpinte la « plaine » kaj « Longchamps », ne ĉesas plivastiĝi al la direkto de la montetoj ; Marsejlo kun la komercanta aristokrataro, kun senfinaj bulvaroj, luksegaj domegoj, ĉarmegaj fontanoj, freŝaj ombroj ; Marsejlo kun la laboristaj kvartaloj, kie loĝantaro senĉese kreskanta sin interpretas en veraj urbetoj ; Marsejlo kun la « Cannebière », belega pordo malfermita al la maro, avenuo de la Marsejla fortuna, monda krucvojo, de kie, simbole, elradias la grandaj vojoj al la plej riĉaj Mediteraneaj urboj.



la fortikaĵo « Saint-Jean »

Marsejlo, fine, kun la « Joliette » kaj novaj basenoj, fiere disvolvitaj laŭlonge de vasta mara fronto, de la fortikaĵo « Saint-Jean » ĝis « Estaque », malfermitaj al ŝipoj portantaj flagojn de ĉiuj maraj popoloj kiuj ĉi tien alportas de mil bordoj specimenoj de ĉiuj varoj kaj homaj rasoj. Kia urbo ĝi estas, kaj kiel oni pravos proklami ĝin unika.

Tere aŭ mare oni alveturu ĝin, rapide kaj bonkore ĝi sindonas al la venintoj. Preskaŭ de

la elirejo de 'l tunelo de la monteto « Nerthe », kaj ankoraŭ pli bone de « Saint-Barthélemy », laŭlonga perspektivo montras ĝin en suda direkto, inter okraj montoj rande de grandega golfo. Malproksime, flavruĝaj kaj blankaj kaboj kun la neta desegno de brilegantaj insuloj sur la ĉiam tremantaj ondoj.

La spektaklo estas ankoraŭ pli grandioza por tiu, kiu venas de la marmezo. Triumfanta reĝino, Marsejlo ventumile malfermiĝas antaŭ du malgrandaj brilaj montaretoj, kun sia mar-

bordo el marmoro, kun la triobla ondiĝo de sia rodo, kiu trembrilas, de sia fumanta haveno, de sia dompopolo, kiu malantaŭeniras al la horizonto. Supre de senfino da grizaj aŭ rozkoloraj tegmentoj, da fabrikkamenoj, kupoloj kaj preĝejoturoj, da havenmagazenejoj, da basejoj pene tenantaj aregojn da ŝipkorpoj, mastoj kaj veloj, staras intervale, duone videblaj, la kupoloj de la katedralo kaj, en la ĉielo, la kvadrata turo, sur kiu flambrilas la orumita statuo de « Notre-Dame de la Garde ».



Notre
Dame
de
la
Garde

LA FEDERACIANOJ ESPRIMAS SIN...

Prozpoeme...

Printempa kanto

Dum belvetera tago, sur kampara vojo, mi promenadas ĝuante la ravan pejzaĝon, kiu sin prezentas antaŭ mi kaj kreas serenon etoson. Mi ekskursas per etaj paŝoj, gustumante la solecon, aŭskultante la susuron de la insektoj, ekstazadmirante la gutojn de roso, kiuj falas el la herboj, vestite per pompaj koloroj lumigantaj mil stelojn. La suno elverŝas siajn kisojn al siaj teneraj floretoj; tiam la lumo ekdancas kiel sovaĝa ĉevalo. Jen rosmarenoj, kiuj mirinde bluas, parfumas miajn fingrojn; jen strangaj floroj, kiuj aspektas kiel papilioj. Estas la festo de la aĵoj parolantaj al mi pri la granda sekreto, kiun ili rakontas al ĉiuj homoj, pri la eterna miraklo ĉiutage malkovrata.

Mia rigardo vagas de mirbelaĵoj al mirbelaĵoj; ĝi ne satiĝas je la aminda spektaklo, kiun oferas la monteto, rozkolora pro timiano, kaj la

rivero, kiu kantas meze de la florantaj kampoj. Per la okuloj, per ĉiuj poroj de mia haŭto, mi ensorbiĝas en tiun naturon. Mi spiras ĝin, mi banas min en ĝi. Mia spirito estas nesatigebla, kaj ĉiam ĝi deziras malkovri. Mia koro estas kiel arbaro loĝata de birdoj, kies amrekantaĵoj resonas en la ĉielo. Mi pensas pri la franca poeto, kiu skribis: « Kie ajn vi troviĝas, restu kun la memoro de via ravo » ?

Antaŭ tia pejzaĝo ni devas esti humilaj, momente halti kaj silenti por malkovri mondon en sablero kaj paradizon en kampa floro. « Vivi estas kredi », diras la proverbo, sed krome « Vivi estas vidi ». Ju pli vi ekzercas vin por vidi, des pli vi sentas vin vivaj.

Dum tiu promonado, mi plektis por vi luman florkronon. Pluku por mi amvortojn, kaj ĵetu ilin en la aeron por ke la mondo aŭskultu tiun esperkanton.

Michèle Freud

VENONTAJ RENDEVUOJ

En nia federacio

Aprilo 28

Regiono de La Ciotat : ekskurso, se la vetero ĝin ebligas.

Rendevuloko : « Col de l'Ange » (A), kie ni atendos vin je la 9a 30 sur granda parkejo. De tie, kunveturado por atingi pli malgrandan parkejon (B), de kie efektive komenciĝos la promenado, sen apartaj malfacilaĵoj, kaj kun daŭra bela vido. Ni povos babili kaj profiti provencajn odorojn. Bonvolu kunporti viajn piknikaĵon, akvon kaj bonan humoron. Viaj ŝuoj estu ne nepre sportaj, sed sufiĉe komfortaj por marŝado sur neasfaltitaj vojoj.

A—Col de l'Ange : N8 inter « Gémenos » kaj « Cuges-les-Pins ».

B—Por malfruantoj: veturu dum 4,6 km de « Col de l'Ange » sur la D1, poste maldestren D3c ; la parkejo situas dekstre. Por pliaj informoj : Jeanine Ratouchniak : 06 85 64 67 01

Majo 5

Le Dramont - « Plage du Débarquement » : pikniko organizota de la klubo « Fréjus - Saint-Raphaël » inf. : M. Prezioso 04 94 83 06 88 aŭ C. Graissaguel 04 94 95 66 18

Junio 8

Avinjono : KER-ekzamensesio – inf. : R.M.Quintin 04 90 94 77 04

Junio 23

Les Issambres (Val D'Esquières, la MES-ejo) : komuna manĝo kun la klubo « Fréjus - Saint-Raphaël » por festi la finon de la lerno-jaro. inf. : M. Prezioso 04 94 83 06 88 aŭ C. Graissaguel 04 94 95 66 18

En Francio

Aprilo 29 – Majo 3

Bouresse survojas al Artigues ! Profitu je bela turisma semajno en Alt-Puatuo en la semajno ĵus antaŭ la IFEF-UFE kongreso. Ĝin organizas la kulturcentro Kvinpetalo. Vi povos malkovri la regionon Alt-Puatuan, ĝian historion kaj ĝian naturon. Gvidos : Catherine Kremer kaj Brian Moon.

Inf. : : informoj@kvinpetalo.org
Tel. : 05 49 03 43 14

Majo 4-7 kaj 8-11

Artigues (apud Bordeaux) : Antaŭkongreso kaj Kongreso de « Espéranto-France » + IFEF (Fervojistoj)
inf. : <http://esperanto-france.org/>

Junio 8

Liono : KER-ekzamensesio (parola kaj skriba partoj).

Junio 8-9

Saint-Brieuc (22 – Côtes d'Armor) : tage avec les intervenants suivants :
1er niveau : Elinjo LE DRU ; 2ème niveau : Josée LAFOSSE ; 3ème niveau : Autogestion :

- ➔ traduction partielle du livre « un million de révolutions tranquilles » en préparation du congrès de SAT à Dinan en 2014.
- ➔ conversation sur des thèmes définis par les futurs participants.

Date limite d'adhésion : 25.05.2013

inf. : Franjo LEVEQUE - 3, rue Voltaire - 22000 – ST BRIEUC Tel : 06 76 27 51 78
leveque.franjo@gmail.com

Junio 15-22

Staĝo en Argentière (valo de Chamonix)
inf. : pascale.voldoire@lvman.net

Somero 2013

en **Greziljono** : restadu unu tagnokton, ĝuu 7 tagojn aŭ feriu dum ĝis 5 semajnoj !

Julio 6-13 : Turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro.

Julio 13-20 : Art-amatora semajno por ŝatantoj de teatro, dancado, kantado, muziko kaj grafika arto.

Julio 20-27: Alternativa MOJOSejo, semajno pri alternativaj temoj kaj por junuloj kun Ŝtonĉo kaj Libnjo.

Julio 27 – Aŭgusto 3: Renkonto de Esperanto-Familioj, 35a REF.

Aŭgusto 3-10 : Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj eĉ kun beboj kaj geavoj?

Aŭgusto 10-17 : Teatra aktora Semajno, aktora

kurso kun Saša Pilipovič, surscenigo de farso kun Georgo Handzilk
inf. : gresillon.org/somero
adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France
telefono: +33-2.41.89.10.34,
retadreso: kastelo@gresillon.org,
retejo www.gresillon.org

Somero 2013 en Kvinpetalo

Junio 11-14 : Japanaj tagoj kun Hori Jasuo kaj Arai Tošinobu

Junio 22-23 : Provludo kaj Koncerto de Interkant' pri Karmen!. Se vi interesiĝas pri tiu ĉi evento, kontaktiĝu rekte kun Manjo Clopeau 02 97 68 98 57 aŭ manjo.clopeau@wanadoo.fr

Julio 12-18 : Muzika staĝo kun Markov-familianoj. Ne necesas esti muzikisto por partopreni. Ankaŭ lingva kurso por komencantoj.

Julio 22-26 : Praktikado de la lingvo
1a nivelo kun Rafaelo Mateos (rekta metodo kun personaj trajtoj)
2a nivelo kun Josée Lafosse : temoj el la ĉiutaga vivo (konversacioj, debatetoj, situacioj, kantoj, poezio, ludoj...)

Aŭgusto 12-17 : promenado tra naturo kaj Vikipedio kun Alain Favre
Inf. : informoj@kvinpetalo.org
Tel. : 05 49 03 43 14

Somero... 2015

Tio okazos post du jaroj... sed jam bone notu la eventon, se ne en agendon ankoraŭ ne ekzistantan, almenaŭ en iun anguleton de via me-

moro : la nordfranca urbo Lillo (Lille) gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2015.

Ekster nia lando

Julio 12 – 18

Herzberg am Harz (Germanio) : 46a ILEI-konferenco

Julio 20 – 27

Rejkjaviko (Islando) : 98a Universala Kongreso de Esperanto

inf. : http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html

Julio 28 – Aŭgusto 4

Madrido (Hispanio) : 86a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda

inf. : <http://satesperanto.org/>

Aŭgusto 3 – 10

Castellaro (apud San-Remo – Italio) : 80a Kongreso de Esperanto en Italujo

temo : Sin kompreni por sin respekti – inf. : <http://kongreso.esperanto.it>

Aŭgusto 10 – 18

Kelmis - « Amikejo » (Belgio) : Esperanta Muzikfestivalo « FESTO », organizota de la junaj francaj esperantistoj de JEFO - inf. : <http://festo.jefo.fr>

Aŭgusto 19 – 26

Kibuco Afikim (Israelo) : Internacia Junulara Kongreso

inf. : <http://www.esperanto.org.il/ijk2013.html>



printempo



printempo



Limdato por sendo de publikotaĵoj
por la venonta numero :
15a de Junio 2013

Bonvolu sendi al : p.vilain83@orange.fr

Antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj